

### **PRETAS PROGRAMO DE LA HISPANA KONGRESO**

Estas jam publikigita la unua versio (provizora) de la programo de la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto okazonta en julio. Vi povas legi ĝin en la adreso: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/337>.

Ĝi komenciĝos la 20-an, vendrede, per bonveniga programero por lernantoj kaj unuafojaj kongresantoj. Poste okazos oficiala inaŭguro, festprelego kaj aliaj kulturaj kaj distraj programeroj. Por sabato matene estas kunvokita Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, kaj kultura kaj turisma programo, kun aliaj prelegoj, atelieroj, kunvenoj de asocioj, malfermo de la Libroservo kaj vizitoj al Madrido.

Posttagmeze komenciĝos la parto komuna al la kongresoj hispana kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Por tiu ĉi ni pretigis interesan programon, kiun ni iom post iom diskonigos.

Ni povas anonci jam ke en la muzika parto de la programo ni ĝuos koncertojn de la grupoj “Kaj Tiel Plu” kaj “Kajto”. Krome, ni proponos “Nacian Vesperon”, kun muziko el Hispanio por niaj vizitantoj, kaj “Internacian Vesperon” kun elmonro de mondaj muzikoj.

En la turisma parto, interesitoj vizitos la urbojn Alcalá de Henares (dimanĉe), Toledo kaj Segovio (merkrede). Madridaj ekskursoj okazos samtempe kun aliaj programeroj, kaj ripetiĝos en diversaj tagoj.



Oni organizos kursojn de Esperanto (en diversaj niveloj) kaj de la hispana lingvo, prezentajn de libroj, Libroservon, anoncojn de eventoj kaj asocioj, atelierojn de literaturo kaj muziko, ktp. Ne mankos prelegoj kaj aliaj instruaj programeroj.

Oni antaŭvidas malferman programon por ekstera publiko, inter kiuj Lingva Festivalo, kun prezento kaj kursetoj de eble trideko da lingvoj, dimanĉe vespere.

La 26an kaj 27an disvolviĝos dulingva Internacia Simpozio “La kultura heredaĵo de Esperanto”, kies kunvokon eblas legi ĉe <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/357>.

Kelkajn detalojn ni konkretigos poste, sed, kiel vi vidas, ne mankos programeroj por ĉiuj!

Vidu pliajn detalojn, kun aliĝilo kaj mendilo por servoj de la Kongresoj, listo de aliĝintoj (jam 215 homoj fine de majo) kaj ĉiuj detaloj en la adreso: <http://www.esperanto.es/kongreso/>

### **AKTIVADOJ POR LERNANTOJ KAJ KOMENCANTOJ**

Por faciligi la ĉeeston de lernantoj de Esperanto kaj komencantoj, Madrida Esperanto-Liceo planas diversajn aktivadojn antaŭ kaj dum la kongresoj.

Ekzemple, ni planas kunvenon de lernantoj de Esperanto (per la reto aŭ per ĉeestaj kursoj), por praktiki la lingvon kaj koni aliajn parolantojn por la 24-a de junio. Ni kunvenos de la 11a ĝis la 14a horoj matene en la parko Retiro, malantaŭ la Vitra Palaco (Palacio de Cristal), kaj depende de la emo kaj ŝato, eble ni eĉ manĝos kune kaj daŭrigos posttagmeze. Ni diskonigos la eventon poste, kun ĉiuj detaloj, sed jam sciigu viajn konatojn kaj aliajn interesitojn.

Ni ankaŭ planas okazigon de intensiva kurso, fare de fama instruisto Dennis Keefe, de la 2a ĝis la 21a de julio. Tio dependos de la intereso, do, se vi konas homojn kiuj ŝatus profiti la someron por lerni aŭ plibonigi Esperanton, bv. skribi al la adreso de "Nia Voĉo".

Krome, kiel menciite antaŭe, dum la Hispana kaj ILEI-kongresoj, ni planis bonvenigan eventon por komencantoj kaj poste, dum pluraj sesioj, kursojn de diversaj niveloj.

## **PLIA POEZIA ELKATAKOMBIGO**

Jam de pluraj jaroj, la kunlaborado inter madridaj hispan- kaj esperant-lingvaj poetoj ĉiam pli oftas, fortas kaj fruktodonas. La pasintan 23an de majo, dudeko da poetoj partoprenis



novan poemdeklamadon migran (de placo al placo) en la renoma madrida kvartalo Malasaña, en la kompanio de violonisto. Kiel ĉiujare, la aranĝon organizis la madrida kultura centro Conde Duque, kunlabore kun la UNO-agentejo ILO (Internacia Labor-Organizo), kaj al ĝi estis invitita la esperantista poeto Miguel Fernández.

Ĉijare pro la abunda maloportuna pluvado, oni estis devigitaj plenumi la programon en la tegmentitaj kortoj, ĉambroj, koridoroj... de la centro Conde Duque. Tie Miguel deklamis siajn poemojn dulingve (hispane-Esperante), kaj denove impresis la ĉeestintojn. Post fino de la pluvo eblis denove deklami surstrate, kiel montras la apuda foto.

## **VIZITOS NIN EN JULIO KAJ AŬGUSTO**

Krom por la kongresoj, jam pluraj homoj anoncis sian venon al Madrido dum la somero. Konkrete, ni atendas diversajn vizitojn komence de julio, kaj ankaŭ en la semajno antaŭ la komenco de la kongresoj mem. Bv. atenti la sociajn retojn por ricevi akuratajn sciigojn.

Krome, estas antaŭvideble ke pluraj homoj revenos tra Madrido post la Internacia Junulara Kongreso (kaj post la UK!), en monato aŭgusto. Interalie sin anoncis jam homoj el Vjetnamio, Peruo kaj aliaj lokoj. Se vi povas renkonti aŭ eĉ gastigi ilin, bv. kontakti nin aŭ anoncu vin en la retlistoj kaj sociaj forumoj de madridaj esperantistoj.

## **KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Sabaton 2-an de junio, okazos la monata babilrondo en la kafejo de la Kulturdomo "Medialab Prado", strato Alameda 15, enirejo vid-al-vid de la Kulturcentro "La Caixa", je la sesa horo.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)